# ESPERANTO ★ TRIUMFONTA ★

**Oficiala Organo de la XV-a Universala Kongreso de Esperanto. — Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.**
**Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komerco" kaj „Revuo" (literatura, popolscienca).**

Protektantoj:

*Dr. Leono Zamenhof*, Warszawa
*W. M. Page*, adv., Edinburgh
*Ernest Archdeacon*, Paris
*J. Gili Norta*, komercisto, Barcelona
*H. Fischer*, grandindustriisto, Bucureŝti
*Frans Schoofs*, Antwerpen
*P. v. Medem*, bank- kaj fabrik-direktoro, Kaunas.

**N-o 146**
**22. 7. 1923**

Redakcio:
Ĉefredaktoro: *Teo Jung.*
Redaktoro: *Robert Kreuz.*
Redakciaj kunlaborantoj:
*Zanoni* (literaturo)
*M. Butin*, L. K.

Administracio:
(Preciza poŝtadreso)
Esperanto Triumfonta
Horrem bei Köln, Germanlando.

Tarifon
vidu sur speciala folio, kiu estas aldonata al ĉiu specimena kaj unua numero de nova abono.

**Antwerpen, Barcelona, Bucureŝti, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa**


# La Itala Registaro reprezentota en la Dekkvina.

La Prezidanto de Itala Esperantista Federacio, s-ano Adv. Kav. A. Vaona, akompanita de Generalo Markizo di Montezemolo, Nacia Komitatano de I. E. F., prezentis la 25-an de junio memorandumon pri Esperantismo kaj pri la celoj kaj deziroj de nacia Esperantomovado al la Regna Ministroprezidanto. Post personaj interparoloj, venis nun skriba konfirmiga respondo (kun prot. n-o 100, dato 30. junio 1923) subskribita por la Ministroprezidanto de L. E. Moŝto la Prezidanteca Subministro Acerbo. La dokumento deklaras la aprobon de la Registaro por la celoj kaj la agado de la gvidantoj de Esperantomovado en Italio kaj rajtigas Generalon di Montezemolo persone transdoni la saluton kaj la bondeziron de la Itala Regna Registaro al la Universala Kongreso de Esperanto en Nürnberg.

*F. E. I.*

## Kongreskaravano Berlin-Nürnberg.

### 3-a (lasta) komuniko.

1. La veturprezoj, kiujn publikigis la L. K. K. en Nürnberg per ET n-o 142, estas malnovaj kaj ne plu validas depost julio. Ili altiĝis je 300% por la 1-a kaj 2-a klasoj kaj je 200% por la 3-a kaj 4-a klasoj. La veturprezo de Berlin al Nürnberg estas nun:

a) 432 000 gmk en la 1-a kl. de rapidvagonaro
b) 216 000 „ „ „ 2-a „ „ „
c) 81 000 „ „ „ 3-a „ „ „
d) 48 000 „ „ „ 4-a „ (tiu klaso ne ekzistas en rapidvagonaro)

Krom tio estas pagotaj pro la rezervotaj sidlokoj en la rapidvagonaro la prezoj por la sidloka karto: Ili estas en la 1-a klaso 6000 gmk
2-a „ 3000 „
3-a „ 1000 „

Rabatitan prezon rifuzis bedaŭrinde la regna fervoja direkcio en Berlino, pro manko de leĝaj paragrafoj por tiaj entreprenoj.

Ĉar la aranĝado de karavano kaŭzas multajn elspezojn (luprezo de la akceptejo, ĉambroserĉado per gazetoj, preskostoj de informiloj, loĝejokartoj, afrankoj, paperajoj ktp.) estas enkalkulita, per la jam forsenditaj informiloj, aldonpago de la partoprenontoj. Tiu krompago estas diversa laŭ la valuto de la landoj.

2. Hotelĉambroj kaj privataj dormejoj estos prizorgitaj en Berlin por tiuj gesamideanoj, kiuj deziras tiajn. La prezo por unu lito kaj nokto en mezranga hotelo estas laŭ mia hodiaŭa (10. VII.) informiĝo 100 000—120 000 gmk (inkluzive 80% deviga fremdulimposto); la prezo por unu lito kaj nokto en privataj loĝejoj estas hodiaŭ 40—60 000 gmk. Prezaltiĝo estas verŝajna. Ĉar la nombro de la disponeblaj privataj dormejoj estas malgranda, ili estas fordonotaj nur al la malbonvalutaj gesamideanoj (germanoj, poloj, estonoj). Tiuj partoprenontoj, kiuj deziras tiajn ĉambrojn, informu min t u j pri la tago kaj la horo de alveno kaj dum kiom da noktoj ili bezonas la dormejojn.

En la stacidomoj „Stettiner Bahnhof" kaj „Bahnhof Friedrichstrasse" estos dum la 30. kaj 31. VII. kelkaj helpemaj Berlinaj gesamideanoj kiel akceptantoj, rekoneblaj per malgranda Esp. flago. Ili kondukos la alvenintojn al la akceptejo: Berlin W., Kurfürstenstrasse 11. Tie oni disdonos al ili la veturbiletojn, loĝejo-kartojn kaj ĉiujn informojn.

4. La 31-an de julio je la 7-a h. vespere okazos senĝena internacia salutvespero en la kafejo „J o s t y, P o t s d a m e r P l a t z".

Al ĉiuj gepartoprenontoj de nia karavano feliĉan kaj bonan alvenon en Berlin!

*Max Blankenheim*
Berlin-Steglitz
Stubenrauchplatz 5.

# Kongresa Programo.

**Merkredo, 1. aŭgusto.**

2½: K. K. K.

Vespere: Interkonatiĝa Vespero kun ĝardenkoncerto kaj Itala Nokto (kongresejo).

**Ĵaŭdo, 2. aŭgusto.**

9—10: Naciaj kunvenoj.

11: Solena Malfermo.

4 Kunsidoj de L. K., Centra Komitato, Konstanta Reprezentantaro de Naciaj Societoj, I. S. A. (Prepara Kunsido), Kat. Germ. Ligo, G. E. A. (ĝenerala kunveno).

7: Festprezentado de „Meistersinger" (Majstrokantistoj) de R. Wagner (Urboteatro). Kabaredo de Literatura Mondo el Budapest (kongresejo).

**Vendredo, 3. aŭgusto.**

9—11: I-a laborkunsido.

11½—1: Filmoj.

3—6: Fakkunsidoj por komercistoj (Komerca Ĉambro), por instruistoj, juristoj, kuracistoj, inĝenieroj, arĥitektoj, studentoj, junuloj, laboristoj, virinoj, poŝtistoj, fervojistoj, katolikoj, Int. Asocio de Biblio-studentoj. Delegitara honorvizito al la tombo de L. Einstein.

Vespere: Madrigal-koncerto (kongresejo), samtempe Blindula Koncerto (Majstrokantistejo). Prisporta parolado de Yrjö Ojander-Helsinki (Bavara Artmetia Muzeo).

**Sabato, 4. aŭgusto.**

8—9½: Katolika kaj protestanta Diservoj.

10¼—11.: Hebrea Diservo. Samtempe fakkunsidoj por foiroj (Komerca Ĉambro), I. S. A. (Ĉefkunveno), Ligo de Ordo, filatelistoj, pacifistoj, junuloj.

Posttagmeze 3.—7.: Fakkunsidoj de Komitato de UEA, instruistoj, laboristoj, monistoj kaj liberpensuloj, fakgvidadoj por teknikistoj tra urbaj institutoj, vizito de kuracistoj al la najbara Universitato Erlangen.

Vespere: Instrument-Koncerto (kongresejo). Lumbildoparolado de August de Marich, Budapest „Ordo devas esti" (Bavara Artmetia Muzeo).

**Dimanĉo, 5. aŭgusto.**

Tuttaga Ekskurso al Rothenburg. Gvidado tra la urbo. Prezentado de la popolteatraĵo „La Majstrotrinko".

Por nepartoprenantoj antaŭtagmeze gvidadoj tra la urbo kaj muzeoj.

Posttagmeze: Ekskurso al Bestparko kaj Dutzendteich (Dekdu Lagetoj).

Vespere: Kabaredo de Literatura Mondo.

**Lundo, 6. aŭgusto.**

9—10½: Fakkunsidoj: Konkordo, kristanoj, teozofoj, Int. Asocio de Biblio-Studentoj, psikistoj, kaj okultistoj, Ruĝa Kruco, oficistoj, laboristoj, vegetaranoj.

10½—12½: II-a laborkunsido.

Tagmeze: Komuna fotografado. Ĝenerala Kongresbankedo (kongresejo).

Posttagmeze: Ekskurso al Schmausenbuck, prezentado de popoldancoj en la Naturteatro. Komuna reveturo.

Vespere: „Natan la Saĝulo" (Urba teatro). Samtempe kantkoncerto (kongresejo),

**Mardo, 7. aŭgust.**

9—11: III-a laborkunsido.

3—5: Internacia Recitado (kongresejo). La kunveno de F. K. K. L. Fakkunsidoj laŭ bezono. Gvidoj tra grandindustriaj entreprenoj.

Vespere: Internacia Kostumbalo (kongresejo).

**Merkredo, 8. aŭgusto.**

9—11: Solena Fermo. Postkongresaj ekskursoj al la Franka Svisujo, Leipzig, Alpoj (reĝaj kasteloj).

*Loka Kongresa Komitato.*

## La Tutmonda Polica Fakkongreso.

**Nürnberg, 30. julio ĝis 1. aŭgusto 1923.**
**(Kongresejo: Katarina Preĝejo.)**

P r o g r a m o.

**Dimanĉo, 29. julio.**

Interkonatiĝa Vespero en la Kulturunuiĝa Domo.*)

**Lundo, 30. julio.**

10.: Solena Malfermo. Salutparoladoj de la diverslandaj delegitoj. Elekto de la kongresaj estraroj.

4.—6.: I-a Laborkunsido: Prezentado de la statutoj de la „Tutmonda Polica Ligo". Klarigo de ĝiaj ĉefceloj. Elekto de la Liga Estraro.

8.: Lumbildparolado „Ordo devas esti" (historio de la ordo kaj polico en la daŭro de la jarmiloj) de s-o Aug. de Marich, Budapest (polica ĉefinspektoro, org. direktoro de T. P. L., ĉefredaktoro de „La Policisto"). Paroladejo: La granda salono de la „Bavara Artmetia Palaco".

*) Ĉiuj oficialaj kunsidoj okazos en la Katarina Preĝejo (malnova Majstrokantistejo).

**Mardo, 31. julio.**

9—1: Gvidadoj tra la urbaj fakinstitucioj kaj kolektoj.

4—6: II-a Laborkunsido. Proponoj pri disvastigo kaj propagandado de la fakliga movado inter la tutmonda policistaro.

Vespere 8½: Senĝena kunesto.

**Merkredo, 1. aŭgusto.**

10—1: III-a Laborkunsido. Decidoj pri la oficiala organo, tutmonda polica almanako kaj pri la universala polica fakterminaro.

4—6: IV-a Laborkunsido. Proponoj pri diversaj policaj institucioj kreotaj. Decido pri la Loko de la venontjara kongreso. Solena Fermo de la kongreso.

Vespere: Interkonatiĝa Vespero de la XV-a Universala Kongreso.

*Loka Kongresa Komitato.*

## Postkongreso en Danzig.

Lastminute oni informas nin, ke la projektita Postkongreso en Danzig

**ne okazos**

pro malfacila situacio ekonomia kaj politika.

## Ekzamenoj dum la XV-a.

Laŭ multaj proponoj la Nürnberga Sekcio de la Esperanto Instituto por la Germana Respubliko okazigos ekzamenojn pri kapableco kaj pri scienca pedagogia kapableco. Aliĝoj al: „Esperanto" (Ekzamenoj) Nürnberg.

# XV-a Universala Kongreso de Esperanto.

## Pasporta vizo.

En lasta tempo aŭdiĝis plendoj el la eksterlando pri malfacilaĵoj ĉe la havigo de pasportaj vizoj, speciale por Bavarujo. Ni represas ĉi tie jus ricevitan depeŝan leteron el Berlin de l' prezidanto de la L. K. K. de Nürnberg:

**Vizo:** Laŭ persona pritrakto en la koncernaj Berlinaj ministerioj la L. K. K. komunikas, ke la instrukcioj bedaŭre prokrastiĝis pro presado, sed efektive eliris komence de julio al la eksterlandaj ambasadoroj kaj konsuloj. La petitan de ni vizorabaton la Registaro bedaŭrinde ne povos doni pro la malbona financa stato de la kongreslando, kies konsulejoj plejparte estas subtenataj per la koncernaj enspezoj. Escepto estas nur ebla, se almenaŭ 20 personoj samlandaj kune vojaĝos kaj havigos al si tiel nomatan kolektiv-pasporton laŭ landpolica regularo.

## Oficiala komuniko.

Ĉeĥoslovakaj konsulejoj en landoj kun meza aŭ malbona valuto donas vizon por duona prezo al kongresanoj montrantaj kongresan karton.

Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista.

# Revelo-Kunveno.

La estraro de Revelo sciigas, ke la Revelo-Kunveno, aranĝota en konekto al la Ireko ne povos okazi pro la neebleco vojaĝi al Koblenz por la plejmulto de la Revelanoj.

La aranĝo de Ireko restas tasko solvota de la Esperanta Grupo de Koblenz.

*Junker*, prezid.

**Rim. de la Redakcio:** Pri la decidoj de la aranĝontoj de la Ireko ni ĝishore aŭdis nenion. Laŭ la faktaj cirkonstancoj veturo al la okupita regiono estas neebla sen speciala vizo. La anglaj aŭtoritatoj eĉ tute ne donas pasportojn por vojaĝo en la okup. regionon. Sendube Ireko ne povos okazi. *R. Kr.*

# Unua interpelacio

## pri Esp. en Pola Parlamento (Sejm)!

**Interpelacio de la sejm-deputito Arturo Pankratz al sinjoro la Ministro por Aferoj Internaj pro sekreta observado de trankvilaj ŝtatanoj Esperantistoj per agentoj policaj.**

Estas konstatite, ke depost kelkaj monatoj trankvilaj civitanoj de la Pola Respubliko estas observataj per sekretaj organoj policaj, verŝajne nur pro tio, ĉar ili estas anoj de la lingvo Esperanto. Tio estas en akra kontrasto al la konstitucio kaj al la sintenado de aliaj ŝtatoj, kies registaroj oficiale subtenas Esperanton. Oni mencias nur Anglujon, Ĉeĥoslovakion, Germanujon, Finlandon, Hispanujon, Brazilion, Ĥinujon kaj aliajn ŝtatojn, en kies lernejoj Esperanto estas instruata parte devige, parte nedevige. La sintenado de la polaj estraroj staras en kontrasto al la opinio de la Ligo de Nacioj, kies raportoj en tiu ĉi afero (komp. A. 5. 1. 1922. kaj A. 81. 1922.) multe impresis en la tuta mondo.

Kiel ĉiu lingvo nacia, tiel ankaŭ Esperanto servas por plej diversaj celoj. Cetere kiel ĉiu alia lingvo, ankaŭ Esperanto estas neŭtrala rilate al religio kaj politiko kaj ne intencas monopoliĝi por iu ajn organizajo; oni do povas ĝin uzi tiel por celoj sciencaj, komercaj ktp. kiel ankaŭ por politikaj kaj religiaj. Tiamaniere uzas Esperanton naciistoj de la plej diversaj ŝtatoj.

(La interpelanto mencias vicon de tiaj ŝtatoj kun naciaj organizaĵoj kaj la tie eldonitajn gazetojn kaj daŭrigas):

Por celoj religiaj uzas interalie Esperanton kelkaj romkatolikaj organizaĵoj, eldonas specialajn gazetojn, ricevis la Papan benon kaj estas subtenataj de la plej altaj aŭtoritatoj eklezia̦j.

Krom supre nomitaj organizaĵoj religiaj kaj dekstre-politikaj uzas Esperanton ankaŭ diversaj laboristaj organizaĵoj naciaj, ekzistantaj preskaŭ en ĉiuj landoj. Kiel plej granda tia organizaĵo, sed pure internacia, kolektanta ĉiujn personojn sen difinita nacieco kaj organizanta ilin tutmonde ekzistas „Sennacieca Asocio Tutmonda", havanta sian sidejon en Paris. La asocio eldonas specialan organon s. t. „Sennacieca Revuo", al kiu kunlaboras mondkonataj verkistoj. La asocio ne sekvas unuflankan tendencon politikan, sed permesas en sia revuo eldiri la opinion de la reprezentantoj de la plej diversaj tendencoj politikaj-maldekstraj.

La legantoj de la eldonita per S. A. T. gazeto „Sennacieca Revuo" estas depost kelkaj monatoj sekrete observataj kaj suspektataj pro propagando komunista resp. anarĥista, malgraŭ ke la statutoj de S. A. T. mencias nek unu vorton pri komunismo aŭ anarĥismo, sed diras pri tio, ke S. A. T. celas „utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda" (art. 1.).

Ĉar oni antaŭ kelkaj tagoj eĉ ne hezitis aresti kaj enkarcerigi unu Esperantiston — politike tute ne agantan — kulpigante lin pro korespondo kun eksterlandanoj en la lingvo Esperanto, por kovri celojn komunistajn, plue ĉar dum la foresto de la arestito policistoj eniris lian loĝejon, rekviziciante literaturon Esperantan, opiniante kiel plej danĝera n-on de „Sennacieca Revuo", n-on de „Esperanto" de UEA, kelkajn vortarojn kaj la konatan Esp. tradukon de „Tri Verkoj" de fama filozofo kaj poeto Tolstoj,— kaj fine ĉar ankoraŭ pli multaj anoj de la lingvo Esperanto, interalie la interpelanto, estas observataj per sekretaj agentoj policaj, — mi demandas sinjoron la Ministron por Aferoj Internaj:

1. Ĉu la supre nomita estas konata al sinjoro la Ministro?

2. Kion sinjoro la Ministro intencas entrepreni kontraŭ la sekreta observado de trankvilaj ŝtatanoj pro ilia aneco al Esperanto aŭ al S. A. T.?

3. Kion sinjoro la Ministro intencas entrepreni por liberigi la arestiton kaj neigi la rekvizicion de Esperanta literaturo?

Warszawa, la 19. VI. 23.

*La interpelanto.*

Tradukita de „Pola Esperanto Servo", Bydgoszcz.

# Kroniko.

Por servi nian legantaron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sciigojn (sur poŝtkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administraj aŭ privataj sciigoj) pri ĉiu novaĵo el la Esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj).

## Landoj.

### Bulgarujo.

Sofia. La Komerca kaj Industria Ĉambro en Sofia donis al la Esp. Societo subvencion de 1000 levoj por bulgarlingva eldono de la protokoloj de la Konferenco de Venezia.

G. Orehovica. Dum la jaro la fervora samideano Bogomil Radoslavov gvidis kursojn por lernantoj de la progimnazio. La kursoj finiĝis per ekzameno kun tre bona sukceso.

Dupnica. La 16. junio okazis la jarkunveno de la grupo „Suno". Nova estraro: sekr.-kasisto Ljubomir Ĉomakov, membroj T. Mijorov kaj Ivan Badinski.

La Regiona Instruista Societo „Hristaki Pavlović" en Dupnica sendis al la Redakcio de „Bulgara Esperantisto" jenan skribaĵon:

La Regiona Instruista Societo en Dupnica „Hristaki Pavlović" en sia kunveno de la 17-a de junio interalie aŭskultis s-on Ljubomir Ĉomakov, kiu parolis pri la bezono de la internacia lingvo „Esperanto" kaj tralegis la Manifeston de la Pedagogia Konferenco de Genève. Konsiderante la senteblan bezonon de internacia lingvo kaj akceptante tre favore la alvokon de la internacia instruistaro, ni la instruistoj de la nomita societo, unuanime decidis subteni per ĉiuj klopodoj por la akceligo de Esperanto. Dupnica, 17. 6. 1923. Subskribo.

### Ĉeĥoslovakio.

Moravká Ostrava. — Okaze de granda komerca kaj metia ekspozicio oni kunvokis la 8-an de julio t. j. la Unuan Labortagon de Esperantistoj el la regiono Mor. Ostrava-Opava. En la hotelo „National" kunvenis 90 samideanoj, inter ili gastoj el Brno, Přerov, Olomouc, Krnov (Jägerndorf). Laŭ la programo okazis antaŭtagmeze laborkunsido. Al la fondita „Distriktaro XIV-a" aliĝis grupoj el Slezská Ostrava, Orlová-Dombrová, Sviadnov, Opava, Vitkovice, Přívoz, Hulváky, Karvinná. La laborkunsido esprimis kaj elsendis proteston kontraŭ la maniero de propono kaj elekto de ĉeĥoslovakaj Lingvokomitatanoj, per kiu estis la regularo de L. K. neatentita kaj vere difektita. La dua Labortago okazos en Opava la 7-an de oktobro 1923. La kunsidon prezidis sukcese s-o D-ro Barvíř el Brno. Posttagmeze ĉiuj vizitis komune la ekspozicion.

### Germanujo.

La unuiĝo de Esp. instruistoj en Saksujo (fond. 1908) ricevis depost la 1-a de majo novan prezidantaron, sidloko Freital. I. prez.: s-o instr. Scheibler, UEA-del., Wurgwitz; kas.: s-o instr. Görner, Freital; protokolanto: s-o instr. O. Müller, UEA-del., Dölzschen. La unuiĝo havas nun 300 pagantajn membrojn el 70 lokoj. Por kvaronjaraj rondskribaĵoj la membroj estas interesigitaj kaj kunigitaj.

En ĉiuj popollernejoj de l' juna urbo Freital (distr. Dresden) Esperanto estas instruata. En la tiel nomata „Lessing-lernejo" oni ĝin instruas al 11—12-jaraj geknaboj. Lastan semajnon 2 samideanoj el Kaunas (Litovujo) vizitis la Esperanto-instruon, la konataj sinjoroj v. Medem kaj Maĉernis. La infanoj priparolis bildon, kiun ili vidis la unuan fojon por montri sian scion. Poste kelkaj deklamis memfaritajn interparolojn kaj ankaŭ kantis Esp. kantojn. Ĉio ĝojinde sukcesis. Post la instruo la gastoj donacis ĉokoladon al la infanoj kaj fotografis ilin.

Interesiĝantaj gesamideanoj, vizitontaj la belan Dresden estas invitataj, ankaŭ viziti la Esp. instruon. Ili venu laŭvole post sciigo al Walter Johne, instruisto en Freital, R. Wagnerplatz 5.

### Latvio.

Laŭ instigo de interesatoj la estraro de la Latvia Fervojista Societo en Riga unuvoĉe aprobis post mallonga diskuto la aranĝon de Esperanto-kurso en la programo de la Societo komence de la nova jaro.

### Rumanujo.

București La 27-an de junio fondiĝis „Esperantista Laborista Grupo", kies gvidantoj estas s-anoj Röth, Lengyel kaj Kelemen. Korespondajon oni adresu al Esp. Centro Rumana, Alea Suter 19.

Sighetul-Marmatiei. S-o Karlo Kudelasz, aktoro ĉe la Urba Teatro, Del. de UEA. preparas kurson.

Targul-Mureș. La 24-an de junio s-o prof. Babos fondis Esp. grupon „Zamenhof" por la gelernantoj de la ŝtata meziernejo, kun 12 anoj. Adreso de la nova grupo: prof. A. Babos. Scoala Medie de Stat.

Zlatna (Transilvanio). — S-o Simono Csora malfermis kurson, en la elementa lernejo afable disponigita de s-o lernejestro Magyary. Lecionoj okazas kvarfoje semajne. Partoprenas dek personoj.

### Esperanto inter rumanaj skoltoj.

La 29-an de junio finiĝis la kurso de Esp. ĉe la skolta kohorto „Pastorul Bucur" en București per ekzameno brile sukcesinta. La ekzamena komisiono — konsistanta el s-oj prof. Traian Georgescu komandanto de l' kohorto kaj s-o Aleksandro Dumitrescu, komandanto de centurio (cento da skoltoj), kaj s-oj Henriko Fischer L. K. kaj pastro Andreo Ĉe, parte de la Esp. Centro Rum. — estis surprizata de la respondoj en flua Esp. post nur unumonata kurso, tre lerte gvidita de s-o Tiberio Morariu, sekr. de Esp. Centro Rum. Post la ekzameno la komisiono disdonis libropremiojn kaj la 4-an de julio vespere en la klubejo de la Esp. Grupo, okazis la solena disdono de la atestoj pri lernado. Samtempe fondiĝis Esperantista Trupo Skolta, kies anoj, dezirantaj korespondi kun ĉiulandaj skoltokamaradoj, petas leterojn al la adreso de skoltestro s-o A. Dumitrescu, București, Strada Palade 31.

### Liberaj tendaroj en Rumanio.

En aŭgusto nunjara la Bucureŝta skoltaro aranĝos du liberajn tendarojn, unu en Vatra Dornei, sub la komando de s-o Leŭtenanto Marin Georgescu, la alia en Toblita-Romana, sub la komando de s-o A. Dumitrescu. En ambaŭ tendaroj okazos Esp kursoj, por kies gvidado oni invitis s-on T. Morariu, instruisto de Esp. Tiuj kursoj estos la preparo kaj komenco al la ĝenerala enkonduko de Esp. ĉe la skoltaro rumana.

## Gazetoj.

Norsk Bokbinder Tidende. Kristiania, n-o 13. Kun adreslisto de Esperantaj librobindistoj.

Camera di Commercio e Industria, Potenza, majo. Bulteno de la Komerca Ĉambro kun raporto pri Venezia.

Messezeitung, Reichenberg, n-o 10, junio. Pri la Esperanto-Servo de tiu ĉi foiro.

Průmyslu Obchodu a Živnosti, Praha, junio. Of. org. de l' Ĉeĥosl. Komerca Ministerio. Pri Venezia.

Le Thérapeute Moderne, Paris 20, n-o 5, junio. Dulingva artikolo pri Int. Labor. Of. — Imitinda ekzemplo.

El Dia, Montevideo, 10. 6. 23. Pri Venezia.

Lubliner Tugblat, Lublin, 14. 6. Kun notoj pri Esp. kursoj. 3. 7. Kun traduko el Esperanto.

Jugoslavenski Narod, Zagreb, 5. 7., 6. 7., 7. 7.

Latwijas Sargs, Riga, 6. 7. Pri Nürnberg. Kontraŭ Ido. — 8. 7. Kun saluto en Esperanto al finlandanoj vizitintaj Latvion.

Rheinisch Westfälische Zeitung, Essen, 6. 7. Artikolo kontraŭ la kongreso de Nürnberg.

Vecer, Zagreb, 6. 7. Pri Nürnberg.

Goniec Śląski, Katowice, 10. 7. Pri Esperanto.

Kosmoglott, Reval, n-o 2, majo.

# Pri instruado.

**Pripensinda por la fakkunveno dum la XV-a.**

## Postkursa devo de la instruanto.

Multe ni legis en ĉiuj Esperantaj gazetoj pri la neceseco, kiel eble plej efike disvastigi nian lingvon, pri la plej malsamaj, jen taŭgaj, jen ne taŭgaj metodoj de la instruado, sed preskaŭ neniam, aŭ tre malofte oni legis pri unu el la plej efikaj manieroj, efektive akceli la disvastiĝon de Esperanto, nome pri la postkursa devo de la instruantoj.

Oni konsideras ordinare finita la taskon de instruanta organo post la kurso, pli ĝustedire: la instruinto plej ofte konsideras sian taskon finita post la kurso, — eble pro laciĝo — kvankam laŭ mia deksesjara sperto la plej malfacila tasko de la instruanto de Esperanto komenciĝas post la kurso.

Ne sufiĉas sole konatigi la lingvon al la lernantoj, sed konstante oni devas eĉ post la kurso interesigi la lernintojn pri ĉiu movado de nia afero, neniam ĉesante veki la interesiĝon neniam laciĝante daŭrigi la perfektigon de la progresantoj, ĉar nur per tio ni akcelas efike kaj bone Esperantismon.

Ni konsideru la simplan fakton, ke multmiloj da komprenemaj homoj komencis jam lerni Esperanton kaj se almenaŭ la dekono estus fariĝinta perfekta, fervora Esperantisto, nepre ni estus jam konkerintaj la tutan mondon kaj tamen ni devas malĝoje konstati, ke ni ne atingis tion, kion ni povis atingi.

Se ni esploras la kaŭzon, ni povas tuj rimarki. — kaj la sperto ĝin evidente pruvas, — ke el la aro de tiuj, kiuj ĝisfine partoprenis en kurso, eĉ ne unu dekono fariĝis daŭra batalanto de nia afero: parte pro tio, ke la malfacilaj vivocirkonstancoj, la luktado senĉesa por havigi la necesaĵojn por vivi, forigis ilin de la movado, parte, sed ne malpli multe pro la manko de interesiĝo ekdormanta por la afero, pro tio, ke la instiganta, fervoriganta spirito de la instruinto ĉesis intensigi la interesiĝon inter la kursfinintoj, daŭrigi ilian perfektigon kaj revivigi la entuziasmon ekĉesantan.

Ne sufiĉas igi ilin anoj de UEA aŭ de loka, landa grupiĝo kaj post tio konsideri la taskon finita, sed oni celadu kunvenigi la kursfinintojn 1—2-foje eĉ pli ofte semajne por ekzerci Esperanton en kvazaŭ intima, amika samideana rondo, kie oni ne parolu nacilingve, eĉ hazarde ne, ĉar oni ja ne volas ekzerci la nacian lingvon. Estas dezirinde, ne kunvenigi tro ofte kaj multajn konatojn, kiuj ne scias paroli la lingvon, ĉar vole-nevole oni estas devigata komenci nacilingvan paroladon, kiu disvastiĝas precipe se la nombro de tiaj vizitantoj estas samokaze granda. Preskaŭ ĉiuj militkaptitoj-Esperantistoj, estintaj en Siberio, kiel konate, estas preskaŭ senescepte flue kaj senerare parolantaj Esperantistoj. Tion ni sukcesis atingi nur tial, ke ni firmavole kaj kategorie decidis unufoje por ĉiam eviti la nacilingvan paroladon en Esperantaj medioj kaj al unuopaj homoj, estantaj Esperantistoj.

Neniam oni forgesu, ke la „Berlitz"-metodo (kiel entute la tiel nomata rekta metodo) estas treege bona kaj taŭga por instrui Esperanton eĉ al komencantoj. Samideano Julio Baghy aranĝis kursojn inter rusoj kaj aliaj diversnaciuloj, tute ne sciante iliajn naciajn lingvojn, tamen post 2—3 monata kurso preskaŭ ĉiuj parolis tute bone Esperanton, ne balbutante.

Estas vere, ke la sukceso multe dependas de la lerteco kaj instrumaniero de la instruanto, fakto estas tamen, ke konstanta senescepta ekzercado de Esperanto, precipe post kurso, estas la plej efika maniero por perfektiĝi kaj preskaŭ la sola por atingi la kapablon facile esprimi siajn pensojn.

Ege grava tasko de la instruinto estas do direkti siajn lernintojn al kunveno, en kiu la supre menciitaj kondiĉoj estas reguloj severe atentataj, kie oni amuziĝante instruas kaj lernas.

Por ke la kunvenoj estu allogaj kaj ne enuigaj, oni aranĝu vespero̦jn kun programo literatura, gramatika, bonhumoraĵa; vintre en fermita ejo, somere eble ekskurse en arbaroj aŭ aliaj taŭgaj lokoj.

Mi ne volas preterlasi la okazon por atentigi pri la graveco de seriozeco, ĉu dum kursoj, ĉu dum kunvenoj post kurso, okaze, de diritaĵoj de komencantoj estas efektive ridindaj. Se oni ne sukcesas atingi al seriozecon, oni foriĝu por ne rimarkigi ion al la komencanto, ĉar male agante, li hontus kaj ne parolus plu kuraĝe.

Estimataj gesamideanoj! Bonvolu ne forgesi la supre diritan kaj kiel kursgvidantoj engravuru en vian memoron, ke la ĉesigo de la komencita laboro post la kurso preskaŭ nulvalorigas vian penadon kaj ke via tasko post la kurso ne jam finiĝis, sed kontraŭe, la plej grava, plej malfacila tasko komenciĝas post via kurso!

Se vi ĉiuj senescepte sekvos miajn modestajn porafera̦jn konsilojn, kredu al mi, ke nia afero ne vivaĉos nur mizere, sed kreskos, floros, kaj ni pli rapide atingos la celon.

*F. Engelmann*, Cluj.

## Instigo al la XV-a.

Rilatas al „Parolejo“ n-o 173.

Mi salutas la fakan kunvenon por la kursgvidantoj, ke ili foje provu esplori la plej simplan sukcesplenan rimedon por la Esperanta instruado. Kiel simpla motorgvidisto de la Wien'a tramvojo mi proponas, ke ili antaŭ ĉio penu esplori ian rimedon por ĉiu lernanto kaj Esperantano, per kio oni povus inokuli la sukcesplenan interesadon por nia lingvo kaj idealo.

Kontraŭ la mon-avideco de tiel nomataj grandkursgvidantoj ni treege bezonas ian efikan inokulaĵon laŭ profesoro Steinach. Preskaŭ ĉiu ET-numero devas raporti pri tia grandnombra aro da novlernantoj, sed malĝoja raporto estus por ET, se ĝi devus priskribi la sukceson je fino de tiel nomataj grandnombraj kursoj.

Multe da proponantoj jam ofte kritikis en ET pri la Esperanto-instruado; laŭ ĉiu propono mi povis atingi ian sukceson, bedaŭrinde mi ne sukcesis ian pli taŭgan rezulton. De nun mi atendas jenan rimedon laŭ mia propono. Ĉu la rimedo estos scienca aŭ medicina, al mi estas tute egale, se ĝi nur efikos, mi ĝoje akceptos ĝin por mi mem, kaj por miaj kamaradoj de la Wien'a tramvojo. Kio koncernas la skriban aŭ buŝan instruadon, mi donas ekzemplon: Antaŭ du jaroj mi mem kun kvardek kamaradoj komencis lerni Esperanton, ankaŭ ni multe skribadis laŭ la instrua metodo de konata instruanto. Sed kia estis la rezultato post ses-monata penada instruado? Inter 40 lernantoj nur unu sola sciis paroli kun ĉiu fremdulo, al kiu li renkontis en Wien sur la tramveturilo. Kion utilas la internacia lingvo, se ili neniam parolas ĝin? Mia metodo dum la pasinta vintra kurso estis, nur paroli kun la lernantoj. Kun dudek-ses partoprenantoj mi komencis, kaj kun dekkvar mi finis la kurson, kaj mi povas garantii, ke tiuj ĉi Esperantistoj almenaŭ je simpla maniero scipovas interkomunikiĝadi kun ĉiu eksterlanda Esperantisto. Skribajn aferojn mi lasas al kleruloj kaj scienculoj.

Mia devizo estas kaj restas ĉiam jena:

Se foje venas amiko el eksterlando kaj vizitas ian Esperantan societon, li devas esti konvinkata, ke la societanoj estas veraj praktikantoj de la lingvo internacia, sed ne trioblaj verdstelportantoj, parolante nacilingve, kaj serĉante la Esperantan vorton el la vortaro, se ili ĵus bezonas ĝin dum la babilado kun samideano el eksterlando. Kio koncernas la korespondadon kun eksterlandanoj, mi laŭ mia propra konvinko antaŭ ĉio malbenas la poŝtmarkinterŝanĝon. Tiaj hipokritaj korespondantoj serĉas nur profiton kaj por ili la lingvo signifas nenion. Fakte estas tre malfacile posedigi al si adresojn de veraj kaj seriozaj praktikistoj de nia lingvo. La plejparto ne superas la meznombran kvaliton. Kaj kiamaniere oni laŭ tio eduku Esperantistojn ĵus finintajn la kurson?

Mi mem ne taŭgas por bonstila senerara korespondado, kio estas treege necesa por nia lingvo, tamen se nur ĉiu komencanto atingus bonkvalitan scion de nia lingvo, tiam ni povos kalkuli, ke ni post kvindek jaroj Esperantigos la tutmondan homaron laŭ la kalkulo en ET antaŭ kelkaj monatoj.

Pro diversaj cirkonstancoj mi ne povos viziti la XV-an kongreson, pro tio mi jam hodiaŭ petas tiun samideanon, kiu esploros la plej simplan sukcesefikan rimedon de instruado, sendu tuj la recepton al mia subskribita adreso. Kaj kio koncernas jenan rapidan gramatikan instruadon dum kelkaj horoj, prenu la ekzemplon de la trioblaj verdstelportantoj kaj de sufiĉe spertaj babilantoj de „Bonan tagon, sinjoro, kiel vi fartas?“

Kaj kion la interesuloj de la lingvo internacia opinias pri tiuj fuŝlingvanoj mi iam raportos, se vi mem nenion estas aŭdintaj.

Kion utilas la gramatika korespondado sen parkera lernado de vortoj?

Per la sama entuziasmo oni devas lerni la lingvon Esperanton, kiel la infaneto lernas sian patrinan lingvon, kaj nur tiamaniere ni atingos nian celon laŭ nia majstro D-ro Zamenhof.

*Karl Lorber*, Wien XII,
Wilhelmstr. 66, Aŭstr.

# Socia Vivo.

## Laborhoroj en Japanujo.

La Kyocho Kai (Asocio por Harmonia Kunlaboro) antaŭ nelonge eldonis la rezultatojn de speciala esploro pri la laborhoroj en diversaj industrioj en Japanujo. Laŭ informoj aperintaj en Sociaj Informoj, la ĉiusemajna eldonaĵo de la Internacia Labora Oficejo, la plej gravaj konstataĵoj de tiu esploro estas la jenaj:

Maŝinista Industrio. Kaŭze de la naturo de la laboro, la labortago en tiu ĉi industrio estas ĝenerale mallonga, kompare kun tiu en aliaj industrioj. Ŝipkonstruaj entreprenoj, kun escepto de la militŝip-arsenaloj kaj la konstruejoj de Mitsubishi, estas akceptintaj la okhoran tagon, kiel bazon por kalkuli la salajrojn. Ĉar la ekstraj laborhoroj estas tamen kutimaj en la fabrikejoj akceptintaj la okhoran tagon, la efektivaj laborhoroj estas preskaŭ la samaj, ĉu la norma labortago estas de ok horoj, ĉu ne. Ĝenerale oni laboras efektive 9 horojn tage aŭ iomete pli.

Teksindustrio. Dum la lastaj jaroj la laboro en la kotonŝpinejoj estis limigita por malgrandigi la produkton. En Julio 1920 la laboro estis limigata je 20 horoj tage en du vicoj, sed depost la 15a de decembro 1921, tiu limigo estas nuligita. Multaj ŝpinejoj nun laboras 22 horojn tage en du vicoj.

En la silkŝpinejoj kaj la lanŝpinejoj oni laboras duvice, sed la vicoj estas 12-horaj. En la jutŝpinejoj la nokta laboro estas forigita kaŭze de la malmultaj mendoj, kaj la plejmultaj el la ŝpinejoj laboras 12 horojn tage.

Ĥemia industrio. Enketo farita en 17 grandaj fabrikejoj montris, ke la plemultaj laboras daŭre tage kaj nokte, kaj ĝenerale en du 12-horaj vicoj. La nombro de fabrikejoj akceptintaj la 8-horan tagon plimultiĝas kaj la plejmultaj el tiuj laboras du vicojn, kelkaj tri vicojn de 8 horoj. La ledofabrikejoj kaj la Kaŭĉukfabrikejoj laboras nur en la taghoroj. En la fabrikejoj havantaj tagajn kaj noktajn vicojn, virinoj kaj junuloj laboras nur tage.

Karbminejoj. La laborhoroj en minejoj diferencas multe kaj eĉ en la sama minejo ne estas unuformaj, kaŭze de la diferenco de procedoj. La esploro traktis speciale la laborhorojn de hakistoj dum la jaro 1921. Kie la unuvica sistemo estis praktikata, la vico estis iuloke 10-hora kaj aliloke 12-hora. Kie la duvica sistemo estis praktikata, la vico estis aŭ 10- aŭ 12-hora. En malmultaj minejoj la trivica sistemo de 8 horoj vice estis uzata.

*Informservo de la Int. Lab. Oficejo, Genève*

# El Naturo kaj Scienco.

## La viktimoj de kelkaj grandaj tertremoj.

Ĉiuj ankoraŭ memoras pri la grandaj tertremoj de la proksima pasinteco, pri tiu, kiu la 2-an de novembro de l' pasinta jaro furiozis je la bordoj de la Ĉilia respubliko kaj pri tiu, kiu okazis la 4-an de februaro de tiu ĉi jaro sur insularo de Havajo. La domaĝoj kaŭzitaj de tiuj tertremoj estis grandegaj. La historio enskribis kelkajn speciale grandajn tertremojn, kiuj skuinte la maron detruis ĉion per grandaj ondoj. Tiel en la jaro 1510 unu el tiaj ondoj en Konstantinopolo englutis 1070 domojn kaj 109 moskeojn. La tertremo, kiu la 1-an de novembro de 1755 detruis Lisabonon, mortigis preskaŭ 90 000 homojn kaj du trionojn el ili mortigis la ondo, alta 5 metrojn, kiun kun granda forto sin ĵetis kontraŭ la bordon. Tiu ĉi ondo ruliĝis laŭ la bordoj eĉ ĝis Svedujo kaj Norvegujo. Kiam la 26-an de aŭgusto erupciis kaj eksplodis la vulkano Krakatao (inter insuloj Sumatro kaj Javo) la maraj ondoj forglutis ĉirkaŭ 40 000 homojn kaj vastiĝis tra la tuta Hinda oceano ĝis la promontoroj de Bona Espero kaj Horn. En la jaro 1896 la tertremo en japana urbo Kamaiŝi forprenis 7600 domojn kaj mortigis 27 000 homojn.

*Skito.*

# Pacifismo.

La 26-an de julio la Komitato „Virinoj kion vi faras“ invitis ĉiujn pacifistajn unuiĝojn en Nederlando kunveni por trovi komunan bazon por kunlaborado. Ĉeestis delegitoj de: Virina unuiĝo por daŭra paco, Unuiĝo por Ligo de Nacioj kaj Paco, Liberala Ligo de Kristanaj Studentoj, Internacia Ligo por Humaneco kaj Justeco, Kooperativa Virina Ligo, Katolika Virina Ligo, Ligo por Katolikaj pacifistaj Virinoj.

Oni decidis sendi manifestojn al Ligo de Nacioj kaj diversaj registaroj.

En la Virina Kunsido okazonta dum la Esp. Kongreso en Nürnberg s-ino Julia Isbrücker, s'-Gravenhage, parolos pri tiu ĉi agado kaj publikigos la nomitajn manifestojn. Ankaŭ viroj sampensantaj estas invitataj viziti ĉi tiun kunvenon.

# Komerco.

## Internacia Varborso kunvenos dum la XV-a en Nürnberg.

Internacia Varborso, fondita laŭ iniciato de s-o Henriko Fischer dum la Internacia Konferenco por Komuna Komerco Lingvo en Venezia, uzis la ĝisnunan tempon por sin interne organizi, klopodante trovi taŭgajn personojn, por garantii al si sekuran ekziston kaj efikan laborpovon.

Dum la XV-a Universala Kongreso en Nürnberg ĝi organizos kunvenojn en la kongresejo, ĉiutage inter la horoj 3-a kaj 5-a posttagmeze. Al tiuj kunvenoj, ne poresperantaj sed peresperante pure komercaj, oni invitas krom la membroj de Internacia Varborso, ĉiujn komercistojn ankaŭ neesperantistajn. Pluajn informojn oni ricevas ĉe la Kongresa Komitato.

# Internacia Sporto.

## Bulgarujo.

La Tirnova Sportklubo (Piedpilka Societo) „Viktoria“ venkis la Tirnovan Sportklubon „Slava“. Rezultato 2:0.

La Rumana Sportklubo „Trikuljor“ ludis kontraŭ Sportklubo „Slavia“ de Sofia. Rezultato: 3:0 je utilo de „Slavia“. Tio signifas, ke „Slavia“ estas la plej forta societo en Bulgarujo kaj Rumanujo.

# Nekrologo.

## S-o Ernesto Packh,

membro de UEA en Lupeni (Transilvanio, Rumanujo), mortis en la aĝo de 19 jaroj. Bonan memoron pri li. *E. C. R.*

## Dr. Charles Webster Williams.

Nur nun kun granda bedaŭro ni sciiĝas, ke Charles Webster Williams, M. B. C. M. Edin., mortis la 25-an de majo en la aĝo de 55 jaroj. Eble en 1919 li aliĝis al la grupo en Manchester, kiu — tiel rapide li progresis — oni elektis lin Prezidanton en 1921, kvankam li depost 1903 jam estis blindulo. Li fariĝis diplomito kun honora mencio en 1922. Dum la prezidanta periodo li ĉiam alparolis la grupon en Esperanto; li fervorege laboris por la movado; li mem varbis multajn subskribantojn al la Petskribo al la Ligo de Nacioj, kaj energie kolektis monon por „Esperanta Ligilo“.

Plue li havis multajn interesojn krom la profesiaj kaj intelektaj.

Treege oni povas bedaŭri la perdon de tia fervora kaj aminda Esperantisto! Tutkore oni simpatias kun la vidvino kaj fratino!

*W. P. M.*

# Parolejo.

## 188. Propono al la Kongresanoj.

Ĉiuj el ni certe havas kelkajn malnovajn vestaĵojn, kiujn ni deziras fordoni. Mi proponas, ke ni kunportu tiom, kiom ni povas enpaki kaj surskribu:

**Por Malriĉuloj en Nürnberg.**

Eble la Loka Komitato afable volas akcepti ilin kaj prizorgi la disdonadon.

Mi scias, ke ofte vojaĝantoj kunportas ion por disdono, sed nesciante, al kiu ili devas doni la aĵojn, ili ĉiam donas ilin al hotel-ĉambristinoj, kiuj kompreneble estas tre dankemaj, sed eble aliaj homoj pli multe bezonas vestaĵojn.

*Margrete Noll.*
København.

Rim. de la Redakcio:
Finonte la preson de tiu ĉi numero, ni ricevis similan proponon de Dr. Bischitzky Praha.

# Leterkesto de ET.

**K. K. en Zittau.** Ni bedaŭras, ke ni povas sendi al vi nur 1 ekz. de la n-o 141. Ni ne posedas plimulte da ĝi. En via urbo estas nun 13 abonantoj.

**Hodiaŭa numero 8-paĝa.**

## Esperantistoj trapasontaj Ĉeĥoslovakion!

Vi nepre devas viziti la belegan „Boheman Paradizon“! Plej taŭga elirloko por la nomita regiono estas la malnova urbo Jičín, konata rezidejo de la fridlanda duko Wallenstein kaj la loko, kie kunvenis tri imperiestroj por interkonsenti kontraŭ Napoleon I. Ĉe Jičin estas Rokaro de Praĥov, la sabloŝtona pordego de „Bohema Paradizo“. Fremdlandaj gesamideanoj denove revenas, kondukante la pluajn. Pro kio vi hezitus viziti nin, se ni donas multajn avantaĝojn? La mez- kaj malbonvalutaj landoj ricevos kontraŭ la kongreskarto la ĉsl. vizon por duona prezo. La reveturkarto de Praha—Jičín kaj reen je malaltigita prezo! Ĉiun antaŭanoncitan samideanon akceptos sur la stacidomo loka Esperantisto. UEA-anoj skribu pri via alveturo tuj al s-o A. Šikl, poŝtoficisto, vicdelegito de UEA en Jičín, aliaj al s-ino Najmanová, prez. de Esp. Rondeto „Comenius“, Jičín, Fügenerova. Dum la Nürnberga kongreso donos ĉiujn informojn la del. de UEA por Jičín, B. Benetka, kiu ankaŭ anoncitajn al li vizitojn de B. P. anoncos al la loka klubo de ĉsl. turistoj, kiu prizorgos al vizitontoj agrablan restadon en la juvelo de la ĉeĥa lando, la lando belega. Do, ne hezitu, skribu hodiaŭ Jičínon, kaj anoncu vian alveturon.

*Bobe.*

## Esperanto en la Praktiko.

„Ju pli ofte Esperanto estos uzata en praktiko, des pli rapide ĝi venkos“ — jen vortoj, kiujn ni tre ofte renkontas nun en niaj gazetoj. Komprenante la verecon de ĉi tiu eldiro, litovaj Esperantistoj jam duan jaron eldonadas informan ĵurnalon pri Litovujo — „Litova Stelo“ kiun havigi al si ĉiu povas tre facile. Sufiĉas skribi al I. Maĉernis, Kaunas, Litovio, Ukmerges pl. 45 simplan poŝtkarton kaj ĉiu Esperantisto ricevos du provonumerojn senpage. Se li poste alsendos du numerojn de iu nacia gazeto, en kiu li presigis iun tradukaĵon el „Litova Stelo“, tiam li ricevados ĝin tutan jaron senpage. Per tiu nia laboro ni ekinteresigis pri Esp. tiajn homojn kaj altajn ŝtatoficistojn, al kiuj aliamaniere alproksimiĝi pro Esp. propagando ne estus eble.

Laŭ sama principo ni ĵus aperigas libron „Litova Almanako“. Ĝi estas 288-paĝa. En ĝi la legantoj trovos ne sole artikolojn pri Litovujo kaj tradukaĵojn el litova literaturo, sed ankaŭ komune interesajn artikolojn, kiel ekzemple, „Regno de Kulturo“ de prof. A. Dombrovski, en kiu nia ŝatata akademiano tre detale pritaktas la libron de Nienkamp „Fürsten ohne Krone“ (Princoj sen krono); plue artikolon de prof. St. Ŝalkauskis „Pri vera patriotismo kaj formoj de ĝia esprimiĝo“, artikolo por nuntempo treege interesa. Samideanoj, kiuj bonvolos traduki ion el la nomita libro por presigi ĝin en sia nacia gazeto kaj poste sendos po du numeroj de tiu gazeto al ni, tre multe helpos nin en plua propagando de Esp., en pliriĉigo de nia Esp. literaturo. Ilia traduklaboro estos rekompencata per senpaga sendado de Lit. Stelo. La libro estas havebla por $3\frac{1}{2}$ svisaj frankoj en la sekretario de Litova Esperanto Asocio, I. Maĉernis Ukmerges plentas 45, Kaunas (Kovno) Litovujo.

# Bibliografio.

Nur duoble ricevitajn librojn, prospektojn k. s. ni mencias aŭ recenzas. Kiam libro aperis bindite, ni petas minimume unu binditan ekzempleron.

## Libroj kaj recenzoj.

**Oficiala Jarlibro 1923 de la Universala Esperanto Asocio (11-a jaro).**

Sole tiu, kiu konas la necesecon de tutmonda organizo Esperantista, ĝuste taksos la valoron de la ĵus aperinta jarlibro de UEA. Ankaŭ la nova eldono estas inda paralelaĵo al la antaŭaj. Aranĝo, enhavo, preso unuvorte estas modernaj kaj modelaj. Diference al la antaŭa eldono la nova libro estas pliriĉigita en la 1-a parto per tre detala Enciklopedio. Tre impresa estas la parto pri skribsistemoj, montranta iliajn diversajn karakterojn. La 2-a parto temas pri Esperantismo, la organizaĵoj, gazetoj, kongresoj, mortintoj ktp. en 1922. La plej valora kaj plej grava parto estas la tria, klariganta la internan organizon kaj indikante la delegitojn en la tuta mondo. La cito de la urboj estas pliriĉigita per mencio de sciindaĵoj el la historio, industrio ktp. Dank' al UEA nia movado hodiaŭ estas universale uzebla. Dank' al la delegitoj la organizo funkcias. Pro tio la jarlibro estas tre taŭga helpilo en la mano de l' praktikisto. — Por seriozaj korespondemuloj kaj por deteni la konatajn malhelpantojn — la pasiaj kolektantoj — la Interŝanĝa Adresaro aperis kiel aparta suplemento. *R. Kr.*

## Prospektoj k. s.

Foiro de Malmö, Svedujo 30. 7.—5 8. Adreso: Kalendegatan 4, Malmö.

Efika reklam-slipo. Seriozaj Esperantistoj nepre devas akceli tiun reklamon.

Berna Oberland, Svisujo (Berna Alpfervojo Bern-Lötschberg-Simplon). 16-paĝa multkolora impresa prospekto kun elperspektiva landkarto. Senpage havebla por diskonigo de: Berner Alpenbahngesellschaft (Bern-Lötschberg-Simplon) Bern, Svisujo.

## Gazetoj.

Kataluna Esperantisto, Barcelona, aprilo-majo. Tre leginda raporto pri la X-a Kongreso de la Kataluna Federacio kaj la Floraj Ludoj.

Konkordo, Zagreb, majo. Kun atentinda artikolo pri la pliperfektigo en Esp.

Katolika Mondo, Graz, majo. Kun nova aldono „Revuo Katolika“.

La Unuigita Tuthomaro, Hamburg 15, majo-junio.

Esperanto Ligilo, Stockholm, junio.

Suomen-Liiton Tiedonantoja — Esperanto-Förbundets i Finland Meddelanden, n-o 1, junio.

Germana Esperantisto, Berlin SW 61, julio. Kun interesa statuto de la Esp. Instituto por la Germ. Respubl. kaj regularo de la ekzamenoj de tiu institucio.

Aŭstra Esperanto Raporto, Wien VI, n-o 4. Kun rimarkinda raporto de objektiva observanto en Venezia, konsulo regist. konsilisto M. Poppauer al la Ministerio por Internaj Aferoj de la Germ.-Aŭstria Respubl.

Holanda Esperantisto, Zutphen, n-o 79, 7. 7.

